



estas ĉiumonata gazeteto por Esperantistoj en Halifax-Dartmouth,  
Upper Rawdon kaj aliloke en Nov-Skotio (kaj ankaŭ por la mondo).

Numero 257

Septembro, 2007

Laborantoj:

Bob Williamson — Redaktoro, preskontrolisto

Stevens Norvell — Kompostisto

Reni Porter — Presisto, enpoŝtigisto, kontisto

Sendu leterojn kaj artikolojn al:

Bob Williamson  
329 Poplar Drive  
Dartmouth, Nova Scotia  
KANADO B2W 4K8  
bob.williamson@ns.sympatico.ca

Sendu abon-monon al:  
Reni Porter

71 RidgeValley Road  
Halifax, Nova Scotia  
KANADO B3P 2E5

Abona kosto por Kanado estas \$8, por Usono \$12, kaj por aliaj landoj estas \$20

☆☆

Kara prof. Norvell,

Mi plezure konfirmas, ke hodiaŭ alvenis la du volumoj de *Inter Ni*, kiujn vi donacis al la Biblioteko Hodler. Mi kore dankas pro tiu grandanima donaco, kiu nun pliriĉigas nian bibliotekon! Kun granda „apetito” mi tuj trafolumis ambaŭ volumojn admirante ilian varian kaj tre interesan enhavon kaj ne laste ankaŭ la bele prizorgitan aspekton. Mi konkludas, ke kiel kompostisto vi ĉefe respondecas pri la aspekto kaj meritas gratulojn ankaŭ pro tio, por ne paroli pri viaj multaj propraj kontribuaĵoj al la enhavo. Miajn elkorajn gratulojn kaj sinceran dankon mi petas transdoni al ĉiuj anoj de via rondo.

Certe oni devos iom atendi, ĝis povos aperi nova simile dika volumo. Intertempe mi estos danka, se via rondo povos sendadi la aperontajn numerojn unuope at Biblioteko Hector Hodler. Koran antaŭdankon!

Kun samideanaj salutoj,  
Osmo Buller  
ĝenerala direktoro de UEA

**Mi multe pardonpetas pro la terura malfruenco de ĉi tiu numero de *Inter Ni*. Nur mi mem kulpas pri tio.**

— Via redaktoro, Bob Williamson

## KOMENTARIOJ PRI FRANCOJ KAJ ANGLOJ EN KANADO

En la julia numero de *Inter Ni* mia amiko kaj samlandano, Francisko Lorrain, aperigis pensigan artikolon, „Francoj kaj Angloj en Kanado”. Pri multo en la artikolo mi tute konsentas. Tamen, mi ial sentas bezonon almenaŭ mallonge respondi, ne por kontraŭi, sed por prezenti iom alian perspektivon.

Mi estas Kanadano, sed mi estas nek franco nek anglo. Mi naskiĝis en Usono, kaj mia gepatra lingvo estas la angla. Mi elektis fariĝi kanadano, kaj Kanado akceptis min, fakte bonvenigis min, kaj pri tio mi porĉiame estos dankoplena.

Mi ne estas anglo pro tio, ke miaj praavoj venis al Nord-Ameriko el Skotlando, Anglio, Francio, Nederlando, Germanio kaj Svislando. Mi supozas, ke mi estas Nord-Amerikano, eble nur miksrasulo. La unua Norvell<sup>1</sup> alvenis en la kolonio Virginia en la jaro 1618, kaj la plej lastatempaj enmigrintoj en mia familio estis la gepatroj de mia avino, kiuj venis el Germanio kaj setlis en Ontario.

Mi imagas, ke multaj kanadanoj, ĉu francparolantaj, ĉu anglaparolantaj, similaj al mi, estas nek francoj nek angloj.

Mia filo parolas la francan nur malforte. Sed mia eta nepino en Novlando nun komencas la edukadon tute en la franca. Mia filo kaj bofilino kaj mi konsentas, ke ĉiu klera kanadano devus paroli kaj la francan kaj la anglan. Tio estas nia vizio de Kanado, kaj ni ĝojas, ke ni havas la oportunon loĝi en dulingva lando.

Jes ja, francoj estis la unuaj eŭropanoj kiuj esploris vastan parton de Nord-Ameriko kiu poste fariĝis Usono kaj Kanado. Mi ĝojas esti samlandano kun la nuntempaj posteuloj de la esploristoj kaj siaj parencoj. Mi tre miras kaj malĝojas, ke multaj el tiuj posteuloj nun deziras cedi ĉion kaj retiri en nur unu provincon. Kaj mi hontas, ke ili sentas tiom nebonvenaj en la tuta lando. La tuta Kanado devas aparteni al ĉiuj kanadanoj!

Se Kebekio forlasus Kanadon, kio okazos al la francparolantoj en Alberto, Ontario kaj Manitobo, kaj al niaj akadianoj en Nov-Brunsviko kaj Nov-Skotio? La influo de Kebekio estas nun pli vasta en la tuta Kanado ol eble oni imagas.

Por multaj diversaj kialoj ni bezonas la kebekianojn resti en Kanado, kaj mi ne ĉi tie klopodos listigi ĉiujn. Kiel pacifisto mi estas dankoplena, ke en Kebekio multaj homoj emas al kontraŭmilitista sinteno. Kiel socioprogresulo, mi estas dankoplena, ke la registaro de Kebekio ofte antaŭeniras tiujn de la aliaj provincoj en socia kaj ekonomia organizado.

Mi konsentas kun Francisko Lorrain, ke se Kebekio sendependiĝus, multaj aferoj restus samaj. Kebekianoj estos daŭre liberaj vojaĝi en nekebekia Kanado kaj nekebekiaj kanadanoj daŭre vizitos Kebekion por sperti la alian kulturon. Nov-Scotio ne abrupte fariĝos pli proksima al Toronto. Malgraŭ tio, estus profunda bedaŭro en mia koro.

Dum multaj jaroj mi estis la redaktoro<sup>2</sup> de ekzameno per kiu ekzameniĝis junaj ĥirurgoj („en trejnado”) en ĉiuj 16 medicinaj fakultatoj en Kanado; tiuj inkludis la tri francparolantaj universitatojn en Kebekio. La aŭspicianta organizaĵo, la Kanada Asocio de Ĝeneralaj Ĥirurgoj, rezolute deziras inkludi ĉiujn. Angla-parolantoj bezonas la francparolantojn kaj reciproke. Kaj simile, la Reĝa Kolegio de Kuracistoj kaj Ĥirurgoj de Kanado estas dulingva organizaĵo por la tuta lando. Pri tiuj organizaĵoj absolute nenio ŝanĝiĝus, se Kebekio sendependiĝus.

Sed estus profunda bedaŭro en mia koro kaj en tiuj de multaj kanadanoj. Mi pardonpetas, ke mi devis prezenti argumentojn el tre persona perspektivo.

— Steĉjo

---

<sup>1</sup>La nomo troviĝis en Skotlando en la 12a jarcento, kaj ŝanĝiĝis de „de Normanville” ĝis „Norville” en nur cent jaroj. Oni supozas, ke la unua „de Normanville” alvenis kun William la Venkinto; se tio veras, li parolis la arkaikan francan lingvon sed estis fakte skandinavo.

<sup>2</sup>Mi fieras, ke mi povis kontribui per kreado de granda dulingva demandobanko por tiu ekzameno malgraŭ mia manko de lingvokapablo en la franca.

## LA UNUA LIBRO EN DUA JARMILO

Antaŭ kelkaj jaroj mi rimarkis perplekse, ke la *Unua Libro* de Zamenhof estis delonge elĉerpita, eĉ en Esperantujo. La *Unua Libro* ne estis libro, sed 40-paĝa broŝuro en unu el kvin lingvoj – la rusa, pola, franca, germana (ĉiuj eldonitaj en 1887) kaj, poste, la angla (1889). Tiel debutis la *Internacia Lingvo de D-ro Esperanto*.

Bonŝance en 1993 mi povis legi fotokopion de ĝi en la Libraro Ludovika de Steĉjo Norvell, kaj poste en dika volumo de la ludovikologia dokumentaro. Sed la verko mem restis ankoraŭ neaĉetebla. Tial mi decidis re-eldoni la anglan version.

Je 2000 mi aperigis la novan eldonon, per nur cent ekzempleroj. Precipe vendita de la Esperanta Ligo por Norda Ameriko (ELNA) – nun konata kiel Esperanto-USA (E-USA) – ili elĉerpis je 2006. Mia amikino Mariĵo instigis min por aperigi ĝin

ankaŭ en la interreto. Kun ŝia helpo pri la HTML-kodigado, mi aperigis la libreton *Dr. Esperanto's International Language* en mia retloko je decembro de 2006 por „Ago Tago”. Ŝi ankaŭ instigis kaj helpis min fari represon de la papera versio. Tiuj 100 ĝisdatigitaj ekzempleroj aperis en februaro 2007.

Ho, Doktoro, jen la Dua Jarmilo. Via papera broŝuro ja vendiĝas, grade kaj malmulte. Semante senplende. Sed rigardu la etendiĝon de la Reto. Tie, la *Unua Libro* atingis post ok monatoj legantaron da pli ol mil, dekope mia unua represo.

Kiel mi scias? Posedanto de retloko povas uzi senpagan servon (ekz., StatCounter.com) por nombri la vizitantojn al sia(j) paĝo(j). Kaj ne nur nombri, sed ankaŭ montri ties deven-landojn, kaj daŭron de vizito(j), kaj eĉ mondomapon kun pingloj, kaj tiel plu. Kompreneble, iom aŭ multaj da vizitantoj nur ekrigardas, ne tralegas. Sed kia diversa devenantaro. La nuna listo ĉe „StatCounter” havas 26 landojn, kaj tiuj estas nur la lastaj cent.

Tio ne estas ĉio. David Simpson ret-eldonis la *Dua-n Libro-n* de Zamenhof, uzante la saman formaton kiel la mia. Lastatempe, Nicholas Bridgewater kontaktis mi el Britujo, petante ke li faru laŭtleĝatan version de la *Unua Libro* por senpaga MP3-a aŭskultado (Librivox.org). Kial ne? Li tuj faris tion. *Dr. Esperanto's International Language* nun aŭdeblas ĉe LibriVox.

La komputila nombrilo ankaŭ montras la ligilojn per kiuj la vizitantoj alvenas. Ĉar mi metis kelkajn ligilojn en Wikipedia kaj Vikipedio, multaj alvenas el tie. Multaj alvenas el LibriVox. Multaj el E-USA. Multaj el la „librejo” de David Simpson (esperanto.davidgsimpson.com). Kaj aliaj.

Do, mi fiere starigas kaj daŭrigas la *Unua-n Libro-n* en la dua jarmilo. Jes, la kvanto restas mikroskopa, sed la rezultoj restas plenesperaj. Ni semu kaj semu.

— Gene Keyes

„Oni diras, ke geedziĝoj estas faritaj en ĉielo. Sed ankaŭ estas fulmo kaj tondro.” — Clint Eastwood, laŭ *Reader's Digest*.

„Estas kiel magio! Kiam oni loĝas sole, ĉiuj el la malbonaj kutimoj malaperas.” — Merrill Markoe, laŭ *Reader's Digest*.

